nia voĉo

madrida esperanto-liceo julio-aŭgusto 2023

## LA *NACIA* FESTO DE ESPERANTISTOJ: LA 26A DE JULIO ĈIUJARE

La 26-a de Julio estos la datreveno de la apero en Varsovio de la *Unua Libro*, la prezentado de la lingvo Esperanto. Do, de antaŭ jaroj oni ofte festas ĝin kiel la Tago de Esperanto, apud la plej konata Zamenhof-Tago, la 15-a de Decembro.




Nun, laborgrupo en la sino de UEA, gvidata de Renato Corsetti, François Lo Jacomo kaj Humphrey Tonkin lanĉis alvokon por festi la tagon kvazaŭ temus pri *nacia* festo. El ilia komuniko:

"Ĉiu lando havas sian nacian feston. Kutime temas pri la dato en kiu okazis grava evento por la nacia komunumo: akcepto de la baza leĝo/konstitucio, venko en milito, fino de milito (kiun oni malvenkis), naskiĝo de la reĝo, forigo de la reĝo kaj starigo de respubliko, ktp. Oni ankoraŭ debatas, ĉu esperantistoj estas popolo, komunumo, grupo aŭ io alia, sed certe ili estas socia grupo kun malklaraj limoj, kiu iras de ĵusaj komencantoj al veteranoj, kaj ankaŭ ili havas siajn festojn (...)Do, tiu mondvasta komunumo rajtas festi la daton de sia apero, la 26an de julio, kaj post jaroj da provoj nun fine UEA decidis voki la esperantistojn por festi ĝin laŭ du planoj. Unuflanke esperantistoj simple kondutu, kiel kondutas ĉiuj aliaj homoj, kiuj festas similajn festojn. Ili festu per kunvenoj, ceremonioj, festaj manĝoj, ekskursoj, donacoj, bondezirado, gazetaraj konferencoj, kaj ĉiu alia agado konvena laŭ la lando kaj la lokaj sociaj moroj."

Krome, ili faras alvokon al la grupoj kaj asocioj "meti la movadon pli en la publikan vivon de la landoj" (vidu la tutan alvokon ĉe: https://sezonoj.ru/2023/06/festo-4/).

La dato ne estas tre konvena en Madrido, ĉar probable multaj el vi forestos, sed, depende de la kvanto da restantaj homoj, ni planas ion organizi por renkontiĝi kaj festi nian *nenacian* feston. Bv kontakti kun Liceo kaze ke vi estas interesata.

## NACIAJ KAJ INTERNACIAJ KONGRESOJ

Kiel ni sciigis en la pasinta numero, kaj ripetas nun, jam komenciĝas la alta sezono de esperantaj someraj kongresoj kaj renkontiĝoj.

La Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉijare en Torino (Italio), inter la 29a de julio kaj la 5a de aŭgusto. Oni atendas ampleksan ĉeestantaron, post la problemoj okazigitaj de la monda pandemio. Je fino de junio aliĝis 1350 homoj, inklude de 48 venontaj el Hispanio. Oni povas trovi ĉiujn informojn, inklude de la manieroj aliĝi, en la retejo de la LKK https://www.esperanto.it/torino2023/ kaj en tiu de UEA.




La 79-a Internacia Junulara Kongreso okazos en Lignano Sabbiadoro, apudmara loko ankaŭ en Italio, inter la 5a kaj la 12a de aŭgusto, tuj post la fino de la UK. Ĝin organizas Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO). Vidu detalojn ĉe: https://ijk2023.tejo.org/. Pluraj madridanoj jam aliĝis. Samtempe kaj samloke okazos la 56-a Kongreso de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI).

Multaj aliaj kongresoj kaj renkontiĝoj estas anoncataj por la somero, inklude de la SAT-kongreso en Greziljono, la Baltiaj Esperanto-Tagoj, la pola aŭ la usona kongreso, interalie.

Krome, indas mencii la plurajn intensajn kursojn programatajn por julio, inter kiuj la usonaj Ĉeestaj Someraj kursoj (NASK-2023), la Somera Esperanto-Perfektigo (SEP-8) en Herzberg (Germanio), aŭ la 7-a Maratona kursaro en Greziljono (Francio). Ili povas taŭgi kiel pretigo de la KER-Ekzamenoj anoncitaj por la semajno de la Universala Kongreso en Torino.

Vi povas ekscii pri ili kaj pri multaj aliaj eventoj, kursoj kaj renkontoj pere de la retejo EventaServo.org.

Kaj fine kaj plej grave, memoru ke post la somero, inter la 12a kaj 15a de oktobro, okazos la Hispana Esperanto-Kongreso, ĉijare en Sevilo. La unuaj informoj kaj la aliĝilo troviĝas en la retejo https://kongreso.esperanto.es/. Jam pli ol cent homoj aliĝis al la kongreso.

## VIDEO DE LA LEGADO DE DON QUIJOTE

La organizantoj de la "Sinsekva legado de la Kiĥoto", okazinta en Círculo de Bellas Artes pasintan aprilon, nun diskonigas la tutan videan registradon de la evento, de pli ol kvardek horoj. La legado de la fragmentoj en esperanto, kiun plenumis Elsa kaj Miguel, aperas en la unua el kvar partoj, ekde la tempo 3 horoj kaj 5 minutoj.

Notindas la aparta longo asignita al esperanto, ĉar ĉiu el ili legis dum sep minutoj. Spektu ĉi tie: https://www.youtube.com/playlist?list=PLVA8r2PJZgO5GFTkhG9o1Z5yjWSfhKEIM (aŭ pli facile per: https://www.youtube.com/circulodebellasartes)

## VIZITOS NIN

Inter la 9-a kaj 11-a de Julio gastos en la fuenlabrada klubejo familio el Danio.

Ankaŭ en julio, konkrete la 12-an, alvenos en Madridon usona esperantisto, Marlon, kiu jam vizitis nian urbon antaŭ kelkaj jaroj. Li intencas resti semajnojn en Madrido kaj aliaj lokoj en Hispanio.

Ni provos organizi ian renkontiĝon aŭ viziton kaj informos per la kutimaj kanaloj (vidu je la fino). Se vi ekscias pri vizitoj de aliaj esperantistoj dum la someraj tagoj, kiuj havas intereson renkonti la madridajn samideanojn, skribu al Liceo, madrid@esperanto.es, kaj ni provos disvastigi la informon. Ni ankaŭ sugestas ke vi vizitu la kutimajn retajn forumojn por tion diskonigi, kaj ankaŭ se vi estas interesataj koni la alvenantajn planojn.

## PLIAJ RENKONTOJ KAJ INFORMOJ

Memoru ke ni renkontiĝas en la strato Idioma Esperanto la unuan sabaton de la monato. En julio tio okazos la 1-an, en la kutima loko, la polpejo Pulpería O Miño, numero 2 de tiu strato Idioma Esperanto de Madrido (metrohaltejo Alsacia, lineo 2). En aŭgusto ne estas apriore antaŭvidita renkontiĝo, kaj ni denove intervidiĝos en septembro

Ni daŭrigas la renkontiĝojn en la sidejo, ĉiujn lundojn ekde la 18,30 horo. Ni proponas komunajn paroladojn, legadojn kaj deklamadojn. Atentu tamen ke pro la ferioj la kalendaro ne estos fiksa, do ni rekomendas ke vi telefonu antaŭ ol veni, ĉefe en aŭgusto.

Por aliaj novaĵoj en Madrido, vizitu regule la retejon de MEL http://www.esperanto.es/mel, kaj la retliston https://groups.google.com/g/esperanto_madride/.

En *Fejsbuko* vizitindas la forumo de MEL: https://www.facebook.com/esperanto.madrid/ aŭ la pli ĝenerala https://www.facebook.com/groups/esperanto.madrid/.En la socia retejo Tŭitero (*Twitter*), vi povas trovi nin ĉe: https://twitter.com/LiceoMadrida.

FELIĈAN SOMERON AL ĈIUJ!

madrida esperanto-liceo

Rodríguez San Pedro 13-3º-7. 28015 Madrid

Regulaj kunvenoj lunde je la 18,30 horo en la sidejo

http://www.esperanto.es/mel/ madrid@esperanto.es

Redaktas Toño del Barrio Komentojn kaj informojn sendu al niavocho@gmail.com